

Nur mi povas vidi tiujn okulojn, nur mi povas aŭdi ŝian voĉon. Ŝiaj ridetoj kaj sonĝoj neniam renkontis malĝojon. Mikaelino hodiaŭ fariĝas 5-jaraĝa.
EKSTRAKTO EL LA DE SINJORO GUSTAVO J. LANTOO
白夜のナイチンゲール



NORD-EŬROPA LANDO PLENA DE ARBA-ROJ. TIA ESTAS FINNLANDO.
Iuj vortoj estas kiel demonoj. Ili povas ŝanĝi sian aspekton laŭvole kaj konfuzi la mensojn, amojn kaj sonĝojn de homoj. Mi nenion bezonas, nur du vortojn mi diros al vi: «Mikaelino» kaj...
EKSTRAKTO EL LA TAGLIBRO DE SINJORO GUSTAVO J. LANTOO
AŬTUNO ESTIS MALLONGA EN FINNLANDO, KAJ PROKSIMIĜIS LA LONGA KAJ PEZA VINTRO, KIU DAŬ-RIS ĈIRKAŬ JARDUONON.
JO-HA-NO!
TIA ESTIS LA SITUA-CIO EN LA BIENO DE GUSTAVO J. LANTOO, EN LA ĈIR-KAŬAĴOJ DE URBO SAVONLINNA.
ATENDU, FRAĈJO! NE KURU TIOM RAPIDE!
HE, JOHA-NO!



ATENDU MIN!!
EK, EK! AKCELIĜU!
HA HA, RAVELIN!
HA HA HA HA
SE VI NE VOLAS RESTI KUN TIU DOMA INTRUISTO, VI BEZONOS ESTI PLI RAPIDA!
MI VIN KAPTIS!
BONEGE! RAVELIN, VI ESTAS PLI RAPIDA OL ANTAŬE.
ĈU VERE?
EBLAS, KE AVINJO LAŬRA KAJ TIU STULTA INSTRUISTO JAM EKSCIIS PRI NIA ESKAPO, KAJ ILI CERTE KOLERAS!





MORD
KAJ MIAJ INSTRUISTOJ ESTAS LA LIBROJ ĈE LA KABINETO DE PAĈJO.
TIE JA ESTAS ĈIAJ LIBROJ!
MI NE BEZONAS DOMAN INSTRUISTON!
ĈIO, KION MI BEZONAS ESTAS TIO, KION VI INSTRUAS AL MI.
PAĈJO LEGIS ĈIUJN, UNU FOJON POST ALIA.
ESTAS VERE ADMIRINDE.
TAMEN...
VRUM
KIAM VI MORDOS LA POMON, ĴETU ĜIN AL MI, ĈU BONE?
NI IRU AL LA ARBARO LUDANTE TIEL!
ĈU VI VOLAS MANĜI?
JES!
HA HA! TIO ESTIS LA AŬTO DE LA INSTRUISTO! LI JAM FORIRIS!



MORD
TRE BONE!
MORD
HAA!
PARDONU, FRATETO! MI ĴETIS ĜIN TRO FORTE!
FAL
AJ!
DIO MIA, KIU ĴETIS TIUN POMON?
VŜŜ


MIA ŜULTRO DOLORAS MIN. EBLE MI EKHAVOS BLUAĴON PRO VI!
VE, NI HELPU ŜIN, JOHANO!
HO, RAVELIN KAJ JOHANO!
STEFANINO!
PARENTEZE... ĈU VI RAJTAS ELIRI EL LA KUIREJO DUM VIA DEĴORO, STEFANINO?
NE FARU ZORGOJN AL VI. ŜI ESTAS IOM TROIGEMA.
RAVELIN ESTAS PLI BONKORA KAJ AGRABLA OL VI!
NE MOKU MIN, JOHANO!
ONI SENDIS MIN SERĈI OVOJN!
BA... EĈ SE ŜI ESTAS BELA, MI MALŜATAS AROGANTAJN HOMOJN.
JOHANO...
ŜI EKAGAS KVAZAŬ SINJORINO, TAMEN ŜI ESTAS NUR SERVISTO.
NU, ŜI JA TURNIĜAS EN BELAN VIRINON, FRATO.
MI NE SCIIS, KE ESTIS KOKEJO PROKSIME DE ĈI TIE...


MI TIMAS, KE VI ESTAS TRO AFABLA KUN ĈIUJ, RAVELIN.
SED...
NU... STEFANINO ESTAS NUR FILINO DE ARBARISTO. KAJ ŜI JA ESTAS NIA SERVISTO...
SED ŜI ANKAŬ ESTAS LA SOLA AMIKO, KIUN NI HAVIS INFANAĜE.
NI HAVIS NUR ŜIN.
ĈU VI MEMORAS LA TEMPON, KIAM NI TRI LUDIS KUNE?
ILI UMAS ĈIAM KUNE.
MI NE POVAS PROKSIMIĜI AL NUR UNU EL ILI...
ILI ESTAS FILOJ DE BIENULO. MI ESTAS FILINO DE ARBARISTO.
SE MI EDZINIĜUS KUN UNU, MI FARIĜUS LA NOVA MASTRO DE LA BIENO.
ĈIUJ JUNAJ VIROJ EL LA VILAĜO, DIRAS KE MI ESTAS LA PLEJ BELA!
HA HA! MI POVOS KONKERI LA KORON DE UNU EL TIUJ DU JUNULOJ!


ĈU VI ESTAS MALKURAĜA, RAVELIN?
NU...
ONI ĈIAM AVERTIS NIN PRI TIU LOKO, ĈU NE?
KIEN VI IRAS, FRATO?
ĈI TIU VOJO KONDUKAS AL LA BLANKFLAMA LAGO.
KAJ SE VI NE VOLAS, MI IROS SOLA.
NE, FRAĈJO! ATENDU MIN!
VINTRE, ĈIUJ LAGOJ EL LA AREO GLACIIĜAS... KROM TIU LAGO.
TIU OKAZAĴO MALTRANKVILIGAS HOMOJN.
EN TIU PARTO DE LA ARBARO MI IAM AŬDIS STRANGAN BIRD-BLEKON, ĈU NI FARU ESPLORON?
MI DO PRAVIS: VI ESTAS POLTRONO!


HMM?
ĈI TIO...
LA FAJRILO DE PAĈJO! NI DONACIS ĜIN AL LI OKAZE DE LIA NASKIĜTAGO!
ĈU PAĈJO OFTE VENAS ĈI TIEN?
EN LA AREO, ESTAS NUR LA BLANKFLAMA LAGO KAJ MALNOVA TURO...
HO! LA AKVO ESTAS KRISTALA! ONI POVAS VIDI LA FUNDON!
LA LAGO ESTAS TRE ĈARMA. ĜI DISRADIAS MISTERON, JOHANO.
KVIVIT.





KVIVIT
JEN TIU KVIVITO!
FOJE MI AŬDAS TIUN STRANGAN KANTON. ĜI VENAS DE PROKSIMA LOKO...
TEMAS PRI TRE MISTERA MELODIO.
KIU BIRDO KAPABLAS KANTI TIEL? MI CERTE SCIVOLAS...
UNUE, ANKAŬ MI PENSIS, KE ESTIS BIRDO.
SED NE. TIAN SONON NE FARAS LA ĈI-REGIONAJ BIRDOJ... ESTAS IO PLI MALOFTA.
EBLE... NAJTINGALO.
NAJTIN-GALO?!
KVIVIT
NAJTINGALOJ NENIAM APERAS ANTAŬ HOMOJ.
ILI ESTAS KIEL MIRAĜO.
NI POVUS KAPTI ĜIN POR SUR-PRIZI ĈIUJN. KION VI OPINIAS, FRATO?
BO-NE!



KRAK
FRAŬLOJ! ESTAS MALFRUE! KIE ESTIS VI DU?!
VIA PATRO ESTAS EN LA MANĜĈAMBRO.
BONE!
LAŬRA ESTAS LA SOLA, KIUN NI OBEAS SENHEZITE.
ŜI SERVAS ĈI TIE DE ANTAŬ 50 JAROJ... NE ESTAS STRANGE, KE NI NOMAS ŜIN «AVINO».
PAĈJO, MI BEDAŬRAS, KE NI MALFRUIĜIS.
SIDU ĈE LA TABLO.


SINJORO!!
ADMONU ILIN AŬ ILI NENIAM ĜUSTIĜOS!
SCIU, KE HODIAŬ ILI FORPELIS LA 18-AN INSTRUISTON!
EVIDENTE ILI DEVAS ĈEESTI LERNEJON, KIEL ĈIUJ ALIAJ JUNULOJ...
SE ILIA FORPASINTA PATRINO VIDUS LA SITUACION!
SINJORETO RAVELIN!
VI DISVERŜAS LA SUPON!
SINJORETO JOHANO!
VIA HARARO FALAS EN LA SUPON. TONDU ĜIN AŬ FARU PONEVOSTON!
LA SINJORO NE ATENTAS SIAJN FILOJN! LI ĈIAM HAVAS LA KAPON ĈE SIAJ PROPRAJ AFEROJ...!
ぷつぷつ
POSTE, IRU AL LA PORTRETO DE VIA PATRINO KAJ PRIPENSU VIAJN AGOJN, ĈU BONE?
JES!


NE GRAVAS LA VORTOJ DE LAŬRA. LI ĈIAM RESTAS EGALE SILENTA.
HMM...
NU, MI POVAS MEMORI NUR UNU FOJON, KIAM LIA MIENO ŜANĜIĜIS.
UNU NOKTON, DUM NI VESPERMANĜIS...
MI INTERESIĜAS PRI LA ĈI-TIEAJ TERENOJ.
EKZEMPLE: LA BLANKFLAMA LAGO, KIU NENIAM GLACIIĜAS DUM VINTRO.
TIO ESTAS MIRINDA POR AMATORA GEOLOGO KIEL MI!
FRAP


LA VIZAĜO DE PAĈJO PALIĜIS, KAJ LI EK-TREMIS...
MI NENIAM VIDIS LIN TIEL NER-VOZAN.
LA SEKVAN MATENON, ONI EKSCIIS, KE TIU INS-TRUISTO ESTIS MAL-DUNGITA.
KIAL TIU AFERO GRAVIS TIOM MULTE AL MIA PATRO?
JOHA-NO...
PAĈJO...
NE ESTAS BEZONATE, KE VI IRU AL LERNEJO. SED VI DE-VAS STUDI PLI SERIOZE.
AN-KAŬ VI, RA-VELIN.
JES, PACĴO.
KIE ESTAS LA FAJRILO, KIUN NI DONACIS AL VI OKAZE DE VIA NAS-KIĜTAGO?
MI LASIS ĜIN EN LA KABI-NETO.
MI NE MANĜOS DESERTON. MI VOLAS KONSULTI LIBRON.


LI EĈ NE RIMARKIS, KE LI PERDIS ĜIN...
NI BEZONIS DU TUTAJN TAGOJN POR ELPENSI BO-NAN DONACON POR LI...
KLAK
NI METU FINAN PUNKTON AL LA VES-PER-MANĜO!
ANKAŬ NI FOR-IRU EL LA MANĜO-ĈAMBRO!
LA SIN-JORO JA ESTAS KOMPLEK-SA ULO...
NENIU!
JEN LA DESER...
!


KIAL NI HAVAS NUR ĈI TIUN PORTRETON DE PANJO, KAJ NENIUN FOTON?
VI TRE SIMILAS ŜIN...
VI HAVAS LA SAMAJN HARARON KAJ OKUL-KOLORON!
ĈU ŜI NENIAM RIDIS TIEL, KIEL LAŬRA, KIES RIDO AŬDEBLAS EN LA TUTA DOMO?
ĈU LA RIDETO DE PANJO ESTIS VERE TIA?
MI NE BONE MEMORAS ŜIAN VIZAĜON. KAJ NI HAVAS NUR LA PORTRETON.
ŜIAJ LIP-ANGULOJ LEVIĜAS POR MONTRI MALVARMAN RIDETON.